

STATUTO

Kvakera Esperanto-Societo

22-an de Oktobro 1977

Reviziita 21-an de Julio /14an de Aŭgusto 2006

1. TITOLO. La nomo de la societo estas Kvakera Esperanto-Societo (KES).
2. CELOJ.
 - i) Informi pri Kvakerismo en Esperantomedioj kaj antaŭenigi la celojn de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj) en la tuta mondo, helpe de Esperanto, per korespondado, literaturo, renkontiĝoj kaj kunvenoj
 - ii) instigi al apliko de Esperanto inter kvakeroj.
3. FINANCO. La Societo estas senprofita, kaj ricevas financon nur per volontaj donacoj.
4. MEMBRECO. La membraron konsistigas ĉiuj individuoj kiuj simpatias kun niaj celoj kaj esprimas sian deziron aliĝi.
5. ORGANO. La organo de KES estas la *Kvakera Esperantisto* (KE), kiu estas regule afiŝita en la interreto kaj sendita en papera formo al petantoj, laŭ oferto al ĉiuj membroj.
6. KURATOROJ.. La kuratoroj respondecas pri la agado de la Societo kaj precipe pri la financoj. Ĉiam estas almenaŭ tri kuratoroj. Unu el la kuratoroj estas kasisto. Estas ĝenerala sekretario kaj membresekretario (ev. la sama persono), kaj ili kaj eventualaj aliaj fak-funkciuloj ne devas esti kuratoroj.
7. ĜENERALA KUNVENO. Ĝenerala kunveno okazas ne malpli ofte ol unufoje en ĉiu trijara periodo. La ĝenerala kunveno planas la ĝeneralan agadon de la Societo. Ĝi estas la plej alta decid-instanco de la Societo, kies solaj limigoj estas sub ĉi tiu Statuto, ke ĝi ne rajtas forigi jam aprobitajn kuratorojn, kaj ke sole la kuratoroj kolektive respondecas pri la kapitalo de la Societo kaj pri proponoj de novaj kuratoraj kandidatoj.
8. ELEKTO. Laŭbezone la kuratoroj suplementas sin mem, proponante novan kandidaton. Ili ankaŭ proponas kandidatojn por la administraj postenoj. La proponitaj kandidatoj funkcias provizore ĝis eventuala aprobo de ĝenerala kunveno. Post la ĝenerala kunveno la ĝenerala sekretario anoncas la elekton en la *Kvakera Esperantisto*. Ĉiu kuratoro, kaj ankaŭ la sekretarioj, devas esti membro de la Religia Societo de Amikoj kaj kompetenta Esperantisto . Kaze de neceso la kuratoroj rajtas peti funkciulon nebone funkciantan transdoni sian oficon al alia membro.
9. REGISTRO. La membresekretario kompilas akuratan liston de la membroj.
10. KOTIZO. Ne estas deviga membrokotizo.
11. RAPORTOJ. La kasisto sendas detalajn raportojn pri la financoj al la kuratoroj, kaj raportoj pri la agadoj de la kuratoroj kaj pri financaj aferoj de la Societo regule aperas en la *Kvakera Esperantisto*.
12. EKSTERAJ RILATOJ. KES kunlaboras plejeble kun taŭgaj kvakeraj kaj Esperantaj organoj.
13. ŜANĜOJN al ĉi tiu statuto rajtas proponi la kuratoroj por eventuala aprobo de ĝenerala kunveno.